



Balenido

Ĵaŭdo, la 7-a de julio 2016

N-ro 6

Konatiĝu: Ĵomart kaj Nataŝa


**Kadre de la arta programo dum
BET-52 merkrede vespere okazis
koncerto de Ĵomart kaj Nataŝa.**



“ĴomArt kaj Nataŝa” estas sveda muzika duopo, kiu havas siajn radikojn en Kazaĥio. ĴomArt kaj Nataŝa kantas kune pli ol 25 jarojn – same longe kiel ili estas paro. Ekde la duopa Esperanto-debuto en Samarkando (1987) ĝis nun la paro koncertis en pluraj UK-oj, IJK-oj, diverslandaj kongresoj kaj festivaloj kaj faris turneojn tra Germanio kaj Francio.

Dum sia artista vojo la duopo kreis ĉirkaŭ cent kantojn, ĉiuj estas origine verkitaj en Esperanto. La kantoj estas emoci- kaj senc-plenaj, kaj temas ofte pri vojaĝoj kaj homaj rilatoj, streboj kaj intencoj.

ĴomArt, kiu plejparte kreas la kantojn, traktas en la tekstoj tion, kio tuŝis ilin. Tial la kantotekstoj estas la ĉefa parto de la kantoj kaj havas ofte filozofian esencon kaj profundecon. Dum siaj koncertoj la duopo ĉiam strebas, ke la aŭskultantaro sentu kaj komprenu la esencon de la kanto. La plej sukcesaj



Programo

La 8-a de julio (vendredo)

- 08.00 – 09.00 **Matenmanĝo** (Manĝejo)
- 09.00 – 10.00 **Somera Universitato.** Prof. Aloyzas Gudavičius: Prelegciklo pri la litovaj lingvo, kulturo, historio (Ĉefsalono)
- 09.00 – 10.00 **Somera Universitato.** Anna Striganova: Decembrista ribelo libera de taksado: historio rakontita de ĝiaj herooj (taglibroj, rememoroj, leteroj); (str. Birutės 21, la tria etaĝo)
- 09.00 – 10.30 **Ĉiunivelaj Esperanto-kursoj** en klasoj de la urba gimnazio (Kęstučio str. 29).
- 10.00 – 10.45 **Somera Universitato.** Prof. Walter Ŝelazny: Prelegserio pri bazaj elementoj de judaismo (Ĉefsalono)
- 10.00 – 10.45 **Somera universitato.** Prelego. Vytautas Ŝilas: Aleksandras Dambrauskas en la antaŭmondmilita agadperiodo (str. Birutės 21, la tria etaĝo)
- 10.00 – 10.45 **Xie Nong: Prelego "Esperanto en Ĉinio"** (Birutės str. 19, la dua etaĝo)
- 10.45 – 12.15 **Ĉiunivelaj Esperanto-kursoj** en klasoj de la urba gimnazio (Kęstučio str. 29).
- 11.00 – 10.45 **Somera Universitato.** Prof. Walter Ŝelazny: Prelegserio pri bazaj elementoj de judaismo (Ĉefsalono)
- 11.00 – 11.45 **Somera Universitato.** Michael Scherm-Markow: Kial legi la libron La Zamenhof-strato? (str. Birutės 21, sur la tria etaĝo)
- 12.00 – 12.45 **Somera Universitato.** Bernard-Régis Larue: Prelego pri vizito de kosmoŝipoj al du nanoplanedoj (Cereso kaj Plutono) en 2015 (Ĉefsalono)
- 12.00 – 12.45 **Somera Universitato.** Dima Ŝevĉenko: Distancaj kaj korespondaj kursoj de Esperanto (str. Birutės 21, la tria etaĝo)
- 13.00 – 14.00 **Tagmanĝo** (Manĝejo)
- 14.30 – 15.15 **Somera Universitato.** Aleksander Korĵenkov: Bakerstrato 221b. La aventuroj de Ŝerloko Holmsa en Esperanto (Ĉefsalono)
- 14.30 – 15.15 **Prelego.** Mikaelo Lineckij: Unika Ukrainio (str. Birutės 21, la tria etaĝo)
- 15.30 – 16.15 **Prelego.** Anna Striganova: Fenomeno de kastritoj-kantistoj kaj ties heredantoj (18+) (Ĉefsalono)
- 15.30 – 16.15 **Kvizo.** Gvidas Marian Zdankowski (str. Birutės 21, la tria etaĝo)
- 18.00 – 19.00 **Vespermanĝo** (Manĝejo)
- 20.00 – 21.00 **Koncerto de Sepa kaj Asorti** (Kurhauzo)



▷ koncertoj por artistoj estas, kiam establiĝas kontakto kaj "silenta" dialogo inter la publiko kaj la muzikistoj.

La kantomaniero de la duopo evoluis de la simpla barda al pli pop-rokeca. Same evoluis la kvalito de la kantado kaj scenplenumado.

Dum lastaj jaroj ĴomArt riĉigis sian gitarludmanieron, aldoninte novan ludteknikon al la kantoaranĝoj. La duopo rearanĝis plurajn malnovajn kantojn laŭ sia nova stilo, kiu plimoderniĝis kaj pliriĉigis la entutan senton de la kantoj. La KD-projekto, en kiu estas rearanĝitaj kantoj, nomiĝas *JomArtaĵoj*. Du el la tri planitaj KD-oj de ĉi tiu projekto jam estas eldonitaj.

La duopo estis la unua Esperanto-grupo, kiu eldonis en eksa Sovetio la unuan vinilan disketon en Esperanto, *Somera mondo*. Poste aperis 3 kasedoj kaj pluraj KD-oj. La duopo ankaŭ partoprenis en KD-kompiloj ĉe kelkaj Esperanto-eldonejoj.

Wolfgang Loose

vivas en Germanio.
Li studis kaj diplom-
iĝis pri fiziko ĉe
la Universitato de
Kolonjo.



Poste li dum pli ol tri jardekoj instruis fizikon en la gimnazio Max Planck en Dortmund. Hobbies li ankaŭ okupiĝas pri Astronomio.

Venontan sabaton li prelegos pri la mezurado de astronomiaj distancoj. Unue temas pri distancoj ene de nia sunsistemo. La dua ŝtupo estas la mezurado de relative proksima fiksaĵoj per la paralaksa metodo. La distancojn de pli malproksimaj astroj oni mezuras per komparado de ilia heleco. Kaj la distancojn de tre foraj galaksioj oni povas pritaksi helpe de ŝoviĝo de spektraj linioj al la ruĝa fino de la spektro.



25-jariĝo de *La Ondo de Esperanto*

Grava evento okazis en Esperantujo dum tiu ĉi BET. *La Ondo de Esperanto*, unu el la plej legataj Esperanto-periodaĵoj en la mondo, celebris sian 25-jariĝon.

La faman gazeton eldonas Aleksander Korĵenkov kaj Halina Gorecka, kiuj unuavice meritas aprezon. Plurajn jarojn la duopo laboras seninterrompe, plenumante taskojn de la tuta redakcio – de la kreaĵoj, postulantaj esplorojn, analizojn kaj literaturan talenton, ĝis multaj teknikaj kiel liverado de la pretaj numerojn al la abonantoj. Alta profesieco kaj firma stabileco – jen estas la trajtoj, absolute nemalhaveblaj en eldona agado. *La ondo de Esperanto* estas brila reveliĝo de tiuj trajtoj.

Korajn gratulojn al la eldonistoj okaze de la glora jubileo! Sanon, fortojn, energion, senvelkan intereson al la afero kaj multajn sukcesojn en la plua prospero! Kaj, certe, multigon de la abonantoj! Vivu *La Ondo de Esperanto* – la gazeto pri ni kaj por ni!

Irina Gonĉarova

Janusz Pokrzywnicki

"Defendaj konstruaĵoj de la deknaŭa jarcento" estis la temo de lia prelego lunde la 4-an de julio en Birŝtono tulpè.

La preleganto parolis pri malfacilaĵoj, ligitaj kun la problema brika heredaĵo de la deknaŭa jarcento, pri la historia disvolviĝo de tiuj defendaj konstruaĵoj, pri problemoj ligitaj kun ilia konservado – kaj donis ekzemplojn de la nuntempa uzado de la fortresaj restaĵoj en diversaj landoj.



Vendrede vespere koncertos Sepa kaj Asorti

Ĉi tiu muzika grupo fondiĝis kiel Asorti en la jaro 1982. Ĝi estas tripersona familia grupo: Edvardas Piščikas, Edgaras Piščikas kaj Elena Piščikienė.

La grupo prezentigas profesie dum grandaj internaciaj muzikaj festivaloj, motorbiciklaj festoj, foiroj, naciaj festoj, urbofestoj, Universalaj Esperanto-Kongresoj, ktp. Muziko de Sepa kaj Asorti sonis en televidaj programoj, ekzemple. “Eurovision”, “X-Faktor”, “Du minutoj da gloro” kaj aliaj. Ĝi kantas en la stiloj kontrea, blusa, folka kaj roka en la lingvoj rusa, litova, angla kaj Esperanto. Ekde sia fondiĝo Sepa kaj Asorti popularigas Esperanton tutmonde por neesperanta publiko pere de grandaj koncertoj por vasta publiko.

Asorti estas ofta koncertanto dum esperantistaj kongresoj kaj renkontiĝoj en Litovio kaj en pluraj landoj. Unuafoje ĝi kantis en Esperanto en Muzo-92 en Litovio. Sekvis Esperanto-koncertoj en Pollando (1993), Belorusio (1993), Hungario (1994), Germanio (trifoje 1995), Belgio (turneo en 1995), Finnlando (UK en 1995) kaj dekoj da koncertoj dum la sekvaj dudek jaroj. Ekzemple en 2015 Sepa kaj Asorti prezentigis en la internacia renkontiĝo “Elloke-Tutmonden” en Verceli



(Italio, marto 2015), Internacia Junulara Festivalo en Brusson (Italio, aprilo 2015), Filmfestivalo en Ĉinio (aprilo 2015), Germana Esperanto-Kongreso en Hameln (majo 2015), SES en Martin (julio 2015), UK en Lillo (julio 2015), IJK en Wiesbaden (Germanio, aŭgusto 2015) kaj en Arkones en Poznano (Pollando, septembro 2015). La grupo eldonis ok muzikajn albumojn en Esperanto: Se povus mi (1994), Ni denove renkontiĝos (1995), Edgar + Asorti (1995), Lernejoj amikoj (2005), Kantu kune (2007), Verda Hejmo (2009), Espero (2013), Teo kaj amo – koloroj de l' mondo (2015).
(Laŭ La Balta Ondo)

Rainis, Aspazija kaj Esperanto

La libro estis eldonita fine de la pasinta jaro, omaĝe al la 150-a datreveno de la gepojtoj, granduloj de la latva literaturo – Rainis (1865-1929) kaj Aspazija (1865-1943).



La libro estas unika pro tio, ke ĝia manuskripto estis preta jam en 1989, sed pro diversaj kaŭzoj la eldono prokrastiĝis. Nun, post pli ol 25 jaroj, oni eldonis ĝin sen ŝanĝoj – tian, kian planis la kompilantino Mirdza Burgmeistere (1922-1989).

La libro enhavas poemojn, fragmentojn el teatraĵoj kaj aforismojn de Rainis kaj Aspazija en la latva lingvo kaj Esperanto, iliajn biografiojn kaj artikolon pri iliaj rilatoj kun Esperanto.

La verkojn tradukis la eminentaj latvaj Esperanto-poetoj Nikolao Ĉurzēns, Elvira Lippe, Arturs Kubulnieks k.a.

Ambaŭ poetoj favoris Esperanton kaj permesis traduki siajn verkojn. Aspazija dediĉis jenan poemon al nia lingvo:

*Ne lingvon nur la lingvo prezentigas,
Animo estas ĝi kaj korpon ligas.
Kaj kiam ligos ĝi la tutan mondon,
Ĝi estos palm', portanta pacan ondon.*

Interesitoj pri la latvaj eminentaj gepojtoj povas trovi plian informon kaj fotojn en mia prezentaĵo „Verkoj de Aspazija kaj Rainis en Esperanto“ (ĉe SlideShare), pri kiu mi prelegis kadre de Somera Universitato de BET-51 lastjare en Tallinn.
Margarita Želve


Gravaj informoj pri la "show-kvizo"

Ni konigas al vi kelkajn informojn pri la vendreda "E-show-kvizo", gvidota de Marian Zdankowski.

Loko: prelegejo sur la tria etaĝo ĉe la strato Birutės 21, sur la tria etaĝo (gastejo Birŝtonotulpé, vidalvide del la preĝejo).

Sciu, ke la salono havas limigitan kvanton da seĝoj (70 sidlokoj), do vi devas alveni antaŭ la 15-a horo. La monpremio por la venkinto estas 100,- €.

Kelkaj eventualaj kvizaj demandoj: "Ĉu hundo bojas, graŭas aŭ jelpas?", "El la antaŭnomo kaj nomo "Nina Ghiwer" kreu la nomon de fama esperantisto". "Kiel nomiĝas la patro de Volapuko?"



Eduard Kozyra

Nova ampleksa vortaro


La Vortaro Esperanta-Angla-Pola, Angla-Esperanta, Pola-Esperanta,

krom tio ampleksa gramatiko de Esperanto priskribita trilingve. Sume 1907 paĝoj kun 3490 mil da signoj. Kompilanto kaj redaktoro: Eduardo Kozyra, Malborko 2014. Tiu ĉi dua eldono estas denove prilaborita, multe pli ampleksa. La vortaro Esperanta-Angla-Pola enhavas ĉ. 17.900 radikojn kaj ĉ. 13.200 derivaĵojn kaj frazeologiaĵojn, do sume ĉ. 31.100, la Angla-Esperanta ĉ. 54.000 kaj la Pola-Esperanta parto ĉ. 48.000. Preskaŭ 34% de la terminoj estas tute novaj, ne enhavas ilin la Esperanta-Pola vortaro de T. J. Michalski (la reeldono: Varsovio 1991), ĉar la vortenhavo de la Michalski-vortaro estas de la fino de 50-aj jaroj de la 20-a jc. Tiu ĉi vortaro indikas transitivajn (tr.) aŭ netransitivajn (ntr.) verbojn (ĉe infinitivo), tio estas tute nova en la pola Esperanto-eldonmerkato. En la angla oni montras la (US) usonajn aŭ (GB) britajn terminojn, se estas diferencoj.

Eduardo Kozyra



La Ondo de Esperanto



La redakcio de *La Ondo de Esperanto* petas ĉiujn abonantojn, kiuj ankoraŭ ne prenis sian ekzempleron de la julia (№7) kajero de *La Ondo de Esperanto* preni ĝin ĉe Halina Gorecka.

La Ondo de Esperanto estas abonebla en BET-52 por la dua jarduono 2016 (kaj por la tuta jaro) je speciale favora abontarifo. Kiel donacon, ĉiu nova abonanto ricevos ankaŭ la junian numeron. La abonojn akceptas Halina Gorecka.

Ĉu vi volas kontribui al *Balenido*?

En *Balenido* vi trovas aktualaĵojn, informojn, anoncojn pri salonoj de la programeroj, eventualajn ŝanĝojn de la programo, precizigojn, priskribon de BET-52, fotojn k.s. La enhavo dependas ankaŭ de la kontribuoj de la BET-anoj mem, kiuj bonvolu raporti pri siaj impresoj, programeroj, ideoj (eks)kursoj ktp, kaj poste aŭ metu siajn kontribuojn en tiucelan skatolon ĉe la akceptejo, aŭ sendu ilin rete al: stano.marcek@gmail.com. Ankaŭ kvalitaj fotoj estas bonvenaj, same kiel pri-BET-aj anekdotoj kaj rakontoj.

Stano Marček, via redaktoro



Ĉu vi jam vizitis la libroservon?

Ĝi troviĝas dekstre de la manĝejo, str. B. Sruogos 6, en Odontologia kliniko. Atendas vin multaj interesaj Esperantaj libroj, diskoj kaj aliaj esperantaĵoj!!!